Mi ĵus aliris la Vikipedion. La kvalito kaj kvanto vere imponas. Ĝi estas unu el la plej bone faritaj kaj utilaj iloj kiujn mi iam vidis en la interreto, kaj aŭguras konstante pli ampleksiĝon kaj valoron. Gratulon al kreintoj de la Esperanta Vikipedio, kiuj meritas medalojn!

– William R. HARMON,
Ĉefdelegito de UEA, Usono, majo 2003

Eĉ se neniu uzos la Vikipedion kiel enciklopedion, ĝi estas tre utila. Por individuo, ĝi estas bonega instigo por praktiki verki kaj traduki. Kaj mi mem lernas multege, eĉ pri temoj pri kiuj mi konsideras min sperta, ĉar antaŭ verki novan artikolon, mi serĉas ĝin en la reto kaj en libroj por informiĝi. Kaj en la Vikipedio, oni povas skribi pri kio ajn interesas lin aŭ ŝin. Kaj tio estas la plej bona maniero lerni.

Kaj multaj homoj volas praktiki verki en Esperanto aŭ traduki al Esperanto, sed ne scias pri kio aŭ ne havas sufiĉe da instigo. La Vikipedio povas doni ambaŭ. Ĉiutage mi malkovras temojn kiuj interesas min. Kaj fine, multaj homoj jam praktikas per verki aŭ traduki sed tiu laboro estas forgesita poste.

Se oni farus tian praktikadon kadre de la Vikipedio, ĝi estus registrita kaj plu utilos al aliaj. Kaj krom por individuoj, ankaŭ por reklami Esperanton la Vikipedio povas esti bonega ilo.

– Jacob SCHWARTZ,
Usona Esperantista Junularo

Mi pensas ke tiu ĉi Vikipedio estas tre interesa temo ĉar temas pri iu libera enciklopedio sed ankaŭ malferma, ni povas en ĉiu momento korekti, modifi, fajnigi... Tio estas alvoko al ni ĉiuj ke ni fariĝu pli kreemaj, ke ni mem verku, kaj tiamaniere riĉigu nin reciproke la tutan esperantistan medion.

– Barbara PIETRZAK,
Radio Polonia, elsendo 2002-04-27

Mi pensis antaŭ jaroj pri TTT kiel medio en kiu aperigi konstante ĝisdatigatan enciklopedion, sed ne sciis, kiel efektivigi tion, kaj cetere mankis al mi la tempo; do mi ĝojas, ke iuj aliaj faras tion, kaj cetere en Esperanto.

– Don HARLOW,
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Estas bonege, ke ekzistas ankaŭ esperanta vikipedio. Ni esperu, ke ĝi rapide disvolviĝos.

– Claude PIRON

http://eo.wikipedia.org/

WIKIPEDIA

VIKIPEDIO

ВИКИПЕДИЯ

ウィキペディア

LA LIBERA ENCIKLOPEDIO

Kio estas la Vikipedio?

Vikipedio estas projekto kunlabore verki liberan, senpagan, plurlingvan enciklopedion per la Interreto. Ĝi estas la unua **vere internacia enciklopedio** en la mondo, samtempe redaktata kaj eldonata en pluraj lingvoj, inter kiuj troviĝas la internacia lingvo Esperanto.

La anglalingva fako de la projekto komenciĝis kiel eksperimento la 15-an de januaro 2001, kaj tiel furiozis, ke pluraj alilingvaj fakoj ekestis por internaciigi la projekton. La esperantlingva fako ekis novembron 2001 kaj je decembro 2003 havas **104 kontribuantojn el 28 landoj**, inkluzive de la verkintoj de la *Enciklopedio Kalblanda* kaj la *Monda Faktlibro*, kiuj donacis centojn da artikoloj pri landoj, lingvoj, religioj, scienco, muziko, kino kaj ĉio homa... kaj vi povas facile aldoni vin al tiu aro da sciodonantoj!

El la reto al librejo

La Vikipedio estas informilo ne nur por la riĉuloj kun komputilo kaj multekosta retkonekto. Pro la liberiga permesilo **GFDL** (*Libera Dokument-Permesilo de GNU*), iu ajn rajtas libere kaj senpage kopii la artikolojn kaj disvastigi ilin al tiuj, kiuj ilin bezonas. Eĉ eblus presi libraron kun la tuta enhavo de la enciklopedio kontraŭ nur la presokosto.

Enciklopedio kunverkata

Vikipedio estas enciklo*pedio* konstruata per ***viki*o** (el havaja *wikiwiki*, "rapide"), unika speco de TTT-ejo **kunverkata**.

Ĉiu *leganto* estas ankaŭ *redaktanto*, kaj rajtas tuj redakti, modifi kaj aldoni artikolojn... tio eble ŝajnas recepto por ĥaoso, sed fakte ĝi estas surprize efika. Ĉiu leganto-kunredaktanto aldonas iom pli da informoj, da perspektivo monda, da bonstilo, kaj la enciklopedio ĉiam pliboniĝas. La maloftaj okazoj de vandalismo estas tuj forviŝitaj, la ĝustaj paĝoj restarigitaj el la arkivo de antaŭaj redaktoj.

Dum la unuaj 3 jaroj de la projekto, la Vikipedio kreskis el nenio ĝis aro da ĉ. 240.000 paĝoj pri diversegaj subjektoj en 25+ lingvoj, inkluzive de **pli ol 10.000 artikoloj en Esperanto** – je la sama nivelo kiel la aktivaj hispana kaj sveda fakoj.

Respondoj al kritikoj

Ĉagrenigis min la ideo ke post granda zorgo konstrui artikolon, eblas ke aliaj tute fuŝos ĝin.

La vikipedio konservas ĉiun ŝanĝon, do se oni fuŝas artikolon, oni povas reveni al pli malnova versio. Oni povas alklaki "Rigardu aliajn reviziojn" kaj vidi ĉiun version de iu artikolo. Ankaŭ, oni alpovas klaki "(malsamoj)" kaj vidi, kio ŝanĝiĝis en la paĝo. Krome, ĉiuj rigardadas la paĝon de *Lastaj Ŝanĝoj*, do stultaĵoj estas rimarkitaj kaj forigitaj.

Se temas pri politiko aŭ religio, ofte okazas, ke personaj sentoj enmiksiĝas. Tio malbonigus la vikipedion, ĉu ne?

Tial ni laboras laŭ **neŭtrala vidpunkto**. Homoj devas skribi faktojn, ne opiniojn. Se estas opinioj, ni forigas tiujn. Ankaŭ ni havas multajn personojn kun malsamaj vidpunktoj. Ni montras respekton por ricevi ĝin reciproke. La kialo de Esperanto estas interkomunikado. Se iu ajn Wikipedia povus havi bonan diskuton pri tio ĉi, tiu estus nia Esperanta Vikipedio!

Vikipedio

http://eo.wikipedia.org/

Informilo plurlingva

La artikoloj en ĉiu lingvo estas interligitaj, por ke plurlingvula leganto povu salti tuj al versio en sia plej konata lingvo – kaj por ke plurlingvaj redaktoroj povu facile transpreni novajn informerojn kaj disvastigi ilin traduke al la aliaj lingvoj. Tiel, la kombinata sperto de la fakuloj de ĉiu lingvularo disponeblas al la tuta mondo.

Esperanto troviĝas en la listo da ligitaj lingvoj same kiel ĉiu alia, tiel ke ne-Esperantistoj eksciu, ke la nia estas serioza lingvo monda, uzata por tiel gravaj aferoj kiel enciklopedio de la homa scio.

Kompreneble, same kiel iu ajn strebaĵo internacia Vikipedio spertas la fifaman **lingvan problemon**: kunverkistoj de la vikioj ne-anglalingvaj ofte ne sentas sin bonvenaj en la estro-retdiskutejoj anglalingvaj. Sed inter ni esperantistoj troviĝas samlingvuloj kaj samlandanoj el ĉiu lingva grupo, ĉiuj egalaj en niaj retkunsidoj. Ni havas la okazon ludi pli aktivan rolon kiel neŭtralaj kunhelpantoj – jam inter la programistoj kiuj prizorgas la retejon estas esperantisto kiu luktas por la bezonoj de la lingvoj ne-okcidentaj.

Verku, verku!

La epoko de la Interreto donas al ni novan kampon tra kiu nia lingvo sen limoj povu servi la homaron helpante al la konstruado de plena, plurlingva, libera informilo por ĉiuj: kaj tiu ilo estas Vikipedio.